WIKIPEDIA

Papiamento

Papiamento (papiamente ankaŭ *Papiamentu*) estas kreola lingvo, parolata en Nederlandaj Antiloj kaj Arubo sed nur sur la ABC-insuloj de ĉirkaŭ 319 mil personoj. Papiamento estas derivata de la portugala 'papear', kio signifas 'paroli'.

papiamenta	
Papiamentu	
Parolata en	Nederlandaj Antiloj kaj Arubo
Parolantoj	319 000
Denaskaj parolantoj	0,3 milionoj
Skribo	latina alfabeto
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	pap
ISO 639-3	pap
SIL	PAP (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=pap)
Glottolog	papi1253
Angla nomo	Papiamento
Franca nomo	papiamento
Vikipedio	

Ĝi estas miksita lingvo kiu ekestis ĉar en la tempo de kolonia sklaveco homoj el diversaj regionoj interkontaktiĝis. Komence la sklavo-komercistoj estis ĉefe hispanoj kaj portugaloj. Iliajn lingvojn plej klare revideblas en la lingvo papiamento.

Papiamento unue aperis kiel portugal-bazita piĝino, kaj poste, ĉar la insulojn akiris unue Hispanio kaj poste Nederlando, la lingvon ankaŭ influis la hispana kaj nederlanda. Ĝi nun estas unu el la oficialaj lingvoj de la Nederlandaj Antiloj. La aliaj estas la nederlanda kaj la angla.

Papiamento suprizas per sia nekutima reguleco. Pro tio ĝi estas relative facile lernebla. Oni parolas ĝin sur la insuloj Kuracao, Bonero kaj Arubo. Bedaŭrinde la insulanaro elektis uzi malsaman ortografion por sia lingvo. Sur Kuracao kaj Bonero oni uzas preskaŭ laŭsonan ortografion, sur Arubo oni uzas hispaneskan, historian ortografion.

Lernolibroj ne abundas. En la angla jen "Papiamentu Textbook, E. R. Gold, 6a eldono, unue eldonita 1962, De Wit stores n.v. Arubo, Nederlandaj Antiloj, sen ISBN". Tiu ĉi estis – en la jaro 2011 – nur brokante havebla. Ĝi uzas la hispaneskan ortografion.

Enhavo

Kelkaj ekzemplaj frazoj

La tezoj de Bernard Golden

Eksteraj ligiloj

Vidu ankaŭ

Referenco

Kelkaj ekzemplaj frazoj

- *Bon bini!* = Bonvenon!
- *Bon dia!* = Bonan matenon!
- *Bon tardi!* = Bonan vesperon!

- *Kon ta bai?* aŭ *Con ta cu bida?* = Kiel vi fartas?
- *Mi ta bon, danki* = Mi fartas bone, dankon
- *Trankilo* = Trankvila.
- *Hopi calor* = Tre varma.
- *Masha danki* = Multan dankon.
- *Di nada!* = Ne dankinde!
- *Tur kos ta bon* = Ĉio estas bona.
- *Hopi bon* aŭ *Tremendo* = Tre bona.
- *Con yama bo?* aŭ *Kon bo nomber ta?* = Kiel vi nomiĝas?
- *Ami yama Raul* aŭ *Mi nomber ta Raul* = Mia nomo estas Raul.
- *Di unda bo ta?* = De kie vi estas?
- *Mi ta bin(i) di…* = Mi venas de… .
- *Mi ta biba na…* = Mi vivas en… .
- *Por fabor* = Bonvolu.


CATECISMO CORTICU

PA USO DI CATOLICANAN

DI

CURAÇAO,

PA

M. J. NIEWINDT,
Prefecto Apostolico
di Curaçao.

1837.

Libro de romkatolika kateĥismo en papiamento.

- *Ta* = esti.
- *(A)mi ta* = Mi estas
- *(A)bo ta* = Vi estas.
- *E ta* = Li estas, Ŝi estas, Ĝi estas.
- *Nos ta* = Ni estas.
- *Bosonan ta* = Vi (ĉiuj) estas.
- *Nan ta* = Ili estas.

- *Traha* = labori.
- *(A)mi ta traha* = Mi laboras.
- *(A)bo tabata traha* = Vi laboras.
- *El a traha (kaba)* = Li (jam) laboris.
- *Nos a traha* = Ni laboris.
- *Bosonan lo traha* = Vi (ĉiuj) laboros.
- *Nan lo a traha* = Ili estus laborintaj.
- *Nos ta trahando* = Ni estas laborantaj.

La tezoj de Bernard Golden

Bernard Golden, en sia artikolo *Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj*,[1] eliras el la konceptoj de piĝinoj kiel porokazaj helplingvoj, nenies gepatraj lingvoj kaj kreolaj lingvoj kiel jam primaraj lingvoj devenaj el piĝinoj. Tradicie lingvistoj iom malatentis ilin, kvankam ja ili konstituas interesajn lingvajn fenomenojn, kaj fakte modelojn por planlingvoj, kiuj siavice plej ofte havas piĝinajn interetnajn celojn, kaj same kiel ili estas mikslingvoj. Kreolaj plej ofte estas facilaj lingvoj mikse inventitaj de filoj de parolantoj de piĝinoj. Tre interesaj kazoj de tiaj lingvoj estas papiamento kaj la svahila. Esperanto povus profiti el tiaj fenomenoj, se ĝi pligrandigas sian facilecon kaj piĝinecon, dum povas esti malhelpita en sia etendiĝo pro alproksimiĝo al funkciado de nacilingvoj. Paŝoj al tiu piĝiniĝo estus la bazaj vortaroj kaj evito de gramatikaj komplikaĵoj de la "trunko" de Kalocsay, la facila lingvaĵo de la revuo Kontakto aŭ la Zagreba Metodo.

Eksteraj ligiloj

- Papiamenta-esperanta vortaro (http://www.majstro.com/vortaroj/papiamento-esperanto) esperante
- Bookish Plaza (http://bookishplaza.com/) librovendejo kun literaturo en Papiamento (angle kaj nederlande)
- Ortografia di Papiamento (http://www.papiamento.aw/main/images/pdf/ortografia/150520_papiamento-ortografia-version-april-2009.pdf) - Enkonduko
- Vocabulario di Papiamento (http://www.papiamento.aw/main/images/pdf/Paw_2009_Vocabulario_di_Papiamento.pdf) (Lista di palabra na Papiamento)
- Lista di Palabra Papiamentu (http://www.fpi.cw/index.php?topic=20110917-Lista_di_palabra_Papiamentu) (Fundashon pa Planifikashon di Idioma)
- Regla di gramatica di Papiamento (http://www.papiamento.aw/main/images/pdf/p.aw_PDF_regla_Gramatica.pdf)
- Stilistica di Papiamento (http://www.papiamento.aw/main/images/pdf/p.aw_PDF_regla_Stilistica.pdf)
- (nederlanda) Sciindaĵoj pri la lingvo papiamento (https://www.slavernijenjij.nl/cultuur-in-slavernij/papiaments-een-jonge-taal/).

Vidu ankaŭ

- Kreola lingvo
- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio
- Aruba Dushi Tera

Referenco

1. ↑ Bernard Golden, *Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj* [1988] en *Interlingvo inter Lingvoj. Prilingvaj Eseoj*, diversaj aŭtoroj, UEA, Roterdamo, 2015. ISBN 9789290171232. 271 paĝoj. paĝoj 29-46.

Lingvo	
	Lingvistiko • Interlingvistiko • Planlingvo • Lingvaj familioj • Lingva filono • Senparenca lingvo
Listoj	alfabetorde • laŭ ISO 639 • laŭ familio • laŭ parolantaro • laŭ skribsistemo
Diverslingve	nombroj • Saluti • danki • idiotismo kaj idiotismaj esprimoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Papiamento&oldid=6967672"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:51, 24 maj. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.